

Traduko el „Nederlands Juristenblad“ de la 14a de junio, 1952, paĝo 501.

Ivo Lapenna. Aktualaj Problemoj de la nuntempa internacia vivo. Fundamenta Nocioj. Lukto por la paco per juraj rimedoj. Internaciaj Organizaĵoj. Roterdamo, 1952. 141 p.

Entuziasma Esperantisto sendis al mi la supran libron (kun aldono 141 paĝojn) kun la peto recenzi ĝin en jura gazeto. Kvankam la libro havas popular-sciencan karakteron, tamen ŝajnis al mi pli bone ke fakulo, praktikanto de la internacia juro, prenu sur sin ĉi tiun taskon, tiom pli, ĉar la, laŭ mia opinio tre interesa, aldono (pri artikolo 36a de la Statuto de la Internacia Kortumo en Hago) havas pure sciencan, internacijuran karakteron. Mi do sendis la libron al kolego kompetenta pri internacia juro.

Sed jen — lia respondo ja metis la problematikon de scienca verko en Esperanto en tre helan lumon. La eminenta konanto de la internacia juro montriĝis nekapabla rilate al ĉi tiu „internacia“ lingvo. Kaj oni apenaŭ povas riproĉi lin pro tio!

Kun mia koro mi staras je la flanko de la Esperantistoj kaj aklamas ilian strebadon. Sed mi timas ke en la praktiko ne povos esti trarompata la cirklo de malbonoj de nekomprenado, kaj tial nesufiĉa produkto, kaj de nesufiĉa produkto, kaj tial ne-farado de la (malgranda) peno por jes kompreni. Ankaŭ la aŭtoro mem, kiel montras lia antaŭparolo, tre klare konscias pri ĉi tiu danĝero. „Sincere dirite, antaŭ ol publikigi ĉi tiun verkon, mi iom hezitis. La deziro paroli en la lingvo amata estis tre forta. La timo, ke eble ne troviĝos sufiĉe da personoj, kiuj pretos aŭskulti, ne malpli senkuraĝiga.“

Estus tre bedaŭrinde se efektive la lingvo estus malhelpo kaj se tial nur kelkaj povus konatiĝi kun ĉi tiu libro. Ĝi enhavas koncizan, kaj miaopinie bonegan, klarigon de la grandaj problemoj de la nuntempa internacia socio, kiu estas interesa ankaŭ — kaj eĉ speciale — por juristoj. La aŭtoro sukcesis ĉe tio observi admirindan objektiveton. Krome la aldono enhavas, kiel mi jam rimarkigis, tre interesan juran kontribuon al la solvo de ne malgrava internacijura problemoj.

Post kelkaj horoj da studado pri la konstruo de ĉi tiu rimarkinda artingvo, ĉiu juristo povos, kelkfoje konsultante vortaron, kun rapide kreskanta facilto legi ĉi tiun verkon. Kaj kial ne fari klopodon trarompi almenaŭ en unu punkton la menciitan cirkon de malbonoj? Laŭ mia nepra konvinko oni ne bedaŭros la faritan penon.

G. VAN DEN BERGH

(Profesoro de ŝtata juro en la Universitato Komunuma de Amsterdamo).

Alia tre favora recenzo pri la sama verko, el la plumo de d-ro Hermann, aperis en „Deutsche Richterzeitung“ de majo 1952 (vidu: Heroldo de Esperanto, n-ro 1163, de 1-VII-1952).

„Liberigo de Timo kaj Mizero“, eldono de la Internacia Asocio Bellamy, Koningstraat 188, Beverwijk, Nederlando. Formato 137×214 mm², 20 paĝoj kun kovrilo. Prezo \$ 0,15, aŭ ned. guld. 0,30, aŭ 2 respondkuponoj. Kompilis Th. Stillebroer; tradukis C. Joon.

„Ekonomia Egaleco“, organo de Internacia Asocio Bellamy, Jarabono kostas 7 resp. kup.

„Tributo al Nobla Geniulo, Paroladoj ĉe la Funebro pro Henry George“, tradukis F. R. Jones. Formato 123×185 mm²; 56+7 paĝoj, kun bela kovrilo. Ĉi tiu libreto enhavas krom la menciitajn paroladojn: portreton de Henry George (1839-1897), antaŭparolon de la tradukinto, la lastan instruon de grafo Leo Tolstoj, antaŭparolon de la kompilinto, enkondukon de Henry George, filo, kaj informojn pri „La Reforma Rimedo de Henry George en la Praktiko“. La libreto estas havebla ĉe: Internacia Unuiĝo por Tervalora Impostado kaj Libera Komercio, 4 Great Smith Street, Londono, S.W. 1, Britujo. Prezo £ -/4/3, \$ 1.— aŭ 13 rpk.

Ni, esperantistoj, kompreneble deziras uzi nian lingvon, ĉu por kolekti poŝtmarkojn, ĉu por simple korespondadi kaj iom informiĝi pri cirkonstancoj kaj kondiĉoj ktp. en fremdaj landoj, ĉu kiel interkomunikilon dum eksterlandaj vojaĝoj, ĉu en nia profesia laboro, ĉu, fine, por diskonigi aliajn ideojn aŭ idealojn kies adeptoj ni estas. Ja parte pro tio organiziĝis aparte, ekzemple, katolikaj esperantistoj kaj SAT-anoj. Ĉu ne por Zamenhof mem pli gravis la homaranismo ol la lingvo Esperanto mem? Ne mirige, do, ke la anoj de diversaj „skoloj“ celantaj la plibonigon de la mondo, i.a. ankaŭ en soci-ekonomia rilato, uzas la internacian lingvon por diskonigi siajn ideojn. Jam pli frue ni havis la okazon anonci aŭ recenzi publikigajojn tiacelajn, kaj hodiaŭ denove kelkaj petas vian atenton.

Por via orientado ni iom grupigu la diversajn skolojn. Oni povas distingi inter kolektivismaj-socialismaj unflanke, kaj ne tiaj aliflanke. La unuaj asertas ke la kerno kaj kaŭzo de la malbonaĵo estas la privata posedo de la produktiloj kaj ke la instigilo, direktilo, kaj bremsilo de la tuta entreprenado estas la profitemo. La socialistoj — divideblaj, cetere, en diversajn grupojn — postulas ke la produktiloj estu kolektiva posedaĵo, kaj ke la bezonoj de la komuno senpere determinu la produktadon. Unu el ĉi tiuj socialistaj grupoj estas tiu de la Bellamy-anoj, kiujn kaptis kaj inspiras la bildo de estonta(?) socio kiun pentris en siaj libroj la usona verkisto E. Bellamy. Resumon de tiuj ideoj oni trovas en la supre menciita broŝureto „Liberigo de timo kaj mizero“.

Determina por ĉi tiuj ideoj estas la etiko, nome certaj nocioj pri justeco. Estas juste ke ĉiu — dum parto de sia vivo — laboru por la komuno laŭ sia eblo, kaj estas juste ke ĉiu kiu plenumas ĉi tiun devon havu rajton pri egala parto el la komuna produktitaĵo. Aliparte oni konscias ke diversaj laboroj povas esti tre diferencaj laŭ agrableco aŭ malagrabeco, pezeco aŭ malpezeco, kaj ke iel oni devos aranĝi, ke la ĝusta nombro da homoj estu disponebla por

ĉiu speco de laboro farenda. Se oni volas konservi la liberan profesi-elekton — kaj tion la Bellamy-anoj volas —, oni devas altiri al la nesufiĉe ŝatataj metioj sufiĉe da laboruloj per specialaj favoroj. Al mi ne estas klare, kial inter tiuj oni akceptas, ekzemple, diferencojn en laborhoroj, en longeco de ferioj, ktp., sed ne diferencon en salajro. Ja tiel oni devas kompensi la nesufiĉan allogecon aŭ la „troan“ allogecon de certaj metioj, kaj sajnās al mi ke la ekskludo de mona kompenco (pozitiva aŭ negativa) estas iom arbitra.

Kiela ajn tio estu, la Bellamy-anoj opinias tian socialismon ideala kaj realigebla; ne tuj, sed iom post iom. Evidente ili — kiel aliaj socialistoj — opinias ke estos eble ke en taŭgaj cirkonstancoj la homoj (ne iuj homoj, sed la homoj, ĝenerale) kondutos socialiste, t.e., ke ilian konduton regos altruismo pli ol egoismo.

Tamen, la socialistoj diversnuancaj ne estas la solaj kiuj opinias necesaj profundajn ŝanĝojn en la ekonomiaj kaj sociaj kondiĉoj. Ekzistas diversnuancaj aliaj grupoj kiuj opinias ke socialismo (sub kiu termino mi komprenas sistemon sub kiu la produktiloj estas propraĵo de la komunumo, kie ne la atendo pri „persona profito“ estas la stimulo por laboro kaj entreprenado kaj la regulilo de la produktado, sed kie oni senpere adaptas la produktadon al la bezonoj de la komunanoj, — sistemo kiu apelacias preskaŭ eksklude al la altruismo en la homoj) ne estas necesa, aŭ preferinda, kaj la George-anoj (ĝorĝanoj) eĉ neas ĝian ĝeneralan ekzistipovon. Ilia argumento por tio estas, ke en la naturo ni ja trovas ekzemplojn de „socialismo“, de senkondiĉa altruismo, de supereco de la kolektivo super la individuo: tiuj ekzemploj estas la ŝtatoj de abeloj kaj diversspecaj formikoj. Konsiderante ĉi tiujn speciojn de insektoj ni trovas ke ili havas komunan trajton kiu nepre distingas ilin de ĉiuj aliaj animalaj specioj ĉe kiuj tiaj „socialismaj“ ŝtatoj ne troviĝas: la altruismaj laboruloj por la komunumo — se ne teorie, do tamen praktike — estas senseksuloj. Ĉar la homo estas sekse animalo, kaj ĉar tio ekskludas ĝeneralan superregan altruismon, la ĝorĝanoj neas la ekzistipovon de socialismo, de taŭge funkciantaj sociaj sistemoj bazitaj sur la homa altruismo.

Laŭ la ĝorĝanoj por sanigi la socion kaj por malebligi ke homoj ekspluatu unu la alian, sufiĉas unu afero: la disponebligo de la tero — de la naturaj riĉaĵoj — al ĉiu kiu volas ĝin ekspluati kaj pretas pagi la adekvatan farmomonon — principe al tiu kiu pretas pagi plej multe. Por atingi tion necesas kaj sufiĉas — laŭ ili — imposti terpropraĵojn tiel ke la tuta ebla terorento estu forimpostata.

Silvio Gesell — ĉirkaŭ la sama tempo kaj poste — montris ke ja la disponebleco de la tero kaj la alsociigo de la terorento estas necesaj, sed neniel sufiĉaj por fari finon al la ekspluatado de homoj fare de aliaj homoj: ja disponebla fariĝus la tero, sed restus la interezo, la rento kiun postulas la mono kaj kiun la mono plu povos postuli tiel longe, kiel oni povos tenadi ĝin sen malprofito (vidu Sc. R. 3 86). Tial la Gesell-anoj (gezellanoj) postulas krom alsociigon de la tero, ankaŭ monreformaĵon kiu ebligu ke la poo de interezo fariĝu nulo. Nur tiam kaj per tio oni likvidus la klasojn kaj la ek-

spluatadon de homoj kaj la klasbatalon. Tiel la ĝorĝanoj, kiel la Gesell-anoj kontraŭas al ĉiaspeca enmiksiĝo de la ŝtato en la ekonomiajn aferojn, en produktadon kaj komercadon de varoj, ktp. Oni do povas diri ke ili pledas por ekonomia liberalismo, sed en alia kadro ol nun ekzistas en la mondo.

Pli-malpli parenca estas la starpunkto de la **socikreditanoj**, kvankam tiuj neniam oficiale esprimis sin ĉu favore al liberalismo, ĉu al socialismo, emfazante nur, ke monreformaĵo necesas ĉiokaze kaj unuavice, kaj ke poste oni ja vidos kiaj pluaj reformoj eventuale ankoraŭ necesos. La socikreditanoj ankaŭ neniam kondamnis la ekzistadon de klasoj. Laŭ mia opinio kombino de la Gesell-aj proponoj kun tiu pri „nacia dividendo“ de la socikreditanoj estas necesa, kvankam eble ankoraŭ ne sufiĉa. Certe estas, ke tiuj kiuj komprenas ke reformoj necesas, kaj ne estas tro optimismaj pri la eblo de mondo de altruismuloj, aŭ eĉ trovas la bildon de tia mondo ne tro alloga, serĉu la solvon en la direkto de ter- kaj mon-reformaĵo.

Ĉiuj direktoj supre menciitaj sin turnas al la esperantista publiko por diskonigi siajn ideojn. La ĝorĝanoj ĵus eldonis en Esperanto-traduko la paroladojn faritajn ĉe la katafalko de Henry George (vidu supre).

El unu el tiuj mi citu jenon: „Ĉi tiu homo ne estis revanto. Li havis nenan planon por reordigi la ŝtaton aŭ rekonstrui la socion. Platono en sia „Respubliko“, More en sia „Utopio“, Bacon kaj Bellamy en siaj verkoj — tiuj pensuloj donis al ni viziojn pri la socio arbitre transformita laŭ siaj (iliaj) limigitaj homaj imagoj. Ili celis ŝanĝi la mondon en tion, kio laŭ iliaj opinioj ĝi devus esti. Ili proponis modifi rezultatojn, anstataŭ studi kaj pli bone direkti kaŭzojn. Ili nesufiĉe pensis pri la ebleco aŭ la justeco de rimedoj por realigi siajn revojn.“

Kontraŭe, Henry George en sia granda verko, „Progresado kaj Malriĉeco“, komencis per esploro de fundamentaj principoj, per ekzameno de absoluta vero, per formulado de aksiomoj, kiel en la matematiko. De tiuj premisoj li rezonis per logikaj deduktoj al neeviteblaj konkludoj. Kaj ĝis nun neniu homo refutis lin.“

Pri Gesell vidu Sc. R. 3 86 kaj ĉi tiun numeron, p. 73, kaj pri Socikredito vidu Sc. R. 2 34 kaj ĉi tiun numeron, p. 78.

== 089.2 = 061.239(100) (058.2) „1952“

Jarlibro de UEA, 1952, Unua Parto. 264 paĝoj. Nur por membroj. Kutima utila informaro. En 61 landoj funkcias 2018 delegitoj, vic-delegitoj kaj fakaj delegitoj. Sendube la utilo de la delegitaro estus ankoraŭ konsiderinde pli granda, se la jarlibro donus plenan informon pri la fakoj kaj temoj pri kiuj ĉiu el la delegitoj pli-malpli speciale interesiĝas aŭ kompetentas. Sufiĉus pliampleksigi la laŭfakan registron en la fino de la jarlibro. Por ŝpari lokon oni povus fari indikojn jene: Nederlando, Amsterdamo, Bakker. Antaŭ ĉirkaŭ 5 jaroj la estraro de UEA decidis ke faka delegito reprezentu ne pli ol unu fakon. Per tio oni, bedaŭrinde, malpliigis la valoron de la delegitaro.